

Antaŭlasta leterkesto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 marto 19 & 21

Cl.- Karaj geaŭdantoj. Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Kiel vi verŝajne jam aŭdis, pro drastaj financaj problemoj devas plene reorganiziĝi la servoj de nia radio, kaj pro tio ĉesos la peronda disaŭdigo de niaj dialogitaj prelegoj en esperanto. Se estas sufiĉe da interesatoj, kasedoservo estos iel abonebla. Povas esti, ke vi tiel rehavos la okazon reaŭdi nin.

A.- Dum la du lastaj semajnoj de marto per lasta leterkesto ni adiaŭos la geaŭdantojn, kies skribaĵojn ni ricevis post nia novjara leterkesto. Tiu salutado donos al ni la okazon rediri nian amikecon al ĉiuj skribintoj, kiujn ni ĉifoje listigas laŭ la landoj.

Cl.- El la afrika lando Accra skribis Cameron SACEY en Mamprobi. Ni citas lin:

A.- "Nome de niaj kamaradoj de la Nova Vivo Esperanto-Klubo ĉe Mamprobi, mi salutas vin elkore kaj samtempe deziras al 'la laboristaro sukceson kaj bonan laboron....Ni esperas, ke estonte estos pli da elsendoj al ni en la Okcidenta Afriko, precipe dum tagaj elsendaĵoj."

Cl.- La laboristaro de Svisa Radio Internacia travivas certe malfacilan periodon. Ĉio estas replanita. Multaj devas draste aliigi sian aktivecon, se ili ne volas perdi sian laboroficon. Kaj koncerne la sorton de esperanto ni citos eron el informa cirkulero, kiun vi eble havos la okazon ricevi:

A.- "Kadre de funda restrukturigo de Svisa Radio Internacia kaj reage al la financa premo flanke de la svisa registaro kaj de la Svisa Radio- kaj Televidosocieto, ni devas anonci al vi, ke la direkcio devis decidi limigi sian buĝeton por tiu ĉi kaj la venontaj jaroj. Tio signifas, ke kun tio reduktiĝas ankaŭ kelkaj ĝisnunaj servoj. Kompreneble, la diskutado pri nova koncepto de SRI tuŝas ankaŭ la statuson kaj sorton de la Esperanto-programo. Pro la supre menciitaj kialoj la direkcio de SRI decidis ekde aprilo 1992 rezigni pri la Esperanto-programo sur la kurtondoj. Tio ne signifas, ke Esperanto entute malaperu. Oni esprimis al la Esperanto-redaktoroj sian intencon tamen konservi Esperanton kiel produktolingvon kaj uzi ĝin estonte laŭ tiel nomataj merkat-ekonomiaj kriterioj. Antaŭvidita estas la uzado de la Esperanto-programo pere de kasedoservo, kiu ofertiĝos laŭ kostokovra maniero al la ĝisnunaj geaŭdantoj kaj eventuale aliaj interesitoj. Krom tio estas planite disponigi la Esperanto-programojn al aliaj radiostacioj en la mondo, kiuj disaŭdigas en la Internacia Lingvo kaj al lokaj radiostacioj, kiuj estas interesitaj parte transpreni niajn elsendojn..."

Cl.- Tiu ĉi informilo konkludiĝas per tiuj ĉi vortoj:

A.- "Koncerne la enhavon de la estonta Esperanto-programo, ni volas promesi interesajn kaj altnivelajn kasedojn kun prelegoj, intervjuoj, muziko kaj aliaj - iom en la stilo de la ĝisnunaj disaŭdigoj. Ilin oni povus uzi ekzemple ankaŭ en Esperanto-societoj. Ni opinias, ke tia bezono ekzistas en Esperantio, kaj ni estus tre kontentaj, se oni kaptus la okazon daŭre utiligi Svisan Radion Internacian por la produktado de Esperanto-programo. Estas unika ŝanco! Informoj, petoj kaj mendoj povas esti direktitaj al: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Cl.- Do ĉiuj el vi, karaj geaŭdantoj, kiuj ŝatus resti en kontakto kun Svisa Radio Internacia, povas skribi por informiĝi pri la kaseda servo. Laŭ la nombro de la mendoj estos organizita aŭ ne tiu ĉi servo. El Aŭstrio skribis Leopold PATEK en Klosterneuburg rakontante por esperanto neordinaran okazaĵon. Ni citas lin:

A.- "Dum ekskurso al Beldeil en Norvegio aŭdigis samideano Theobald Hermann el Svedio vian elsendon helpe de SONY-ricevilo per la mikrofono de la aŭtobusa laŭtparolilo. Estis unika travivaĵo aŭdi vian programon dum vojaĝo en aŭtobuso."

Cl.- Kaj nun Belgio, kie ni salutu Jean Pierre, Rita kaj Liza en Eupen, kaj (Ĵef stals) J. STAELS en Bruselo, kiu sendis 2 mesaĝojn.

A.- En Brazilo nin certe aŭskultas Antonio Augusto MAJRA AREKO en Guaratingueta.

Cl.- El Britio venis pluraj mesaĝoj. Niajn amikecojn ni diras al Rob Hardy en Brandon, Sydney FOX en Girton kaj Ges-roj Bruno kaj Mary Najbaro en Keighley, kiuj sendis 17 aŭdmesaĝojn. Ni citas ilin:

A.- Per la hodiaŭa prelego Gakond vere gratulinde montris al ĉiuj aŭskultantoj kiel monstra ŝtato estus Eŭropo sub la hitlera reĝimo. Dank' al ĉielo nun pli saĝaj kuraĝaj homoj konstruas komunan Eŭropon humanan. Ni forte esperas, ke via lando ankaŭ partoprenos en tiu konstruado pli aktive ol ĝis nun. Vi svisoj havas gravegan lecionon por la konstruantoj.

Cl.- Kiel pluraj aliaj geaŭdantoj gesinjoroj Najbaro deziras ricevi la kasedon, kie reaŭdiĝos niaj elsendoj pri la svisa neŭtraleco. Ĉiuj skribintoj, kiuj petis tiun kasedon ricevos informojn post kelkaj monatoj. En Britio ni ankoraŭ salutu J. M. PATERSON en Winchester kaj Mark RISON en Cambridge.

A.- El Bulgario ni ricevis mesaĝon de Canko MURGIN en Sofio.

Cl.- Kaj el Ĉeĥoslovakio de Jaroslav KARHAN en Olomouc. Ni citu lin:

A.- "En marto 1992 estos solenata grava kultura evento: la 400-jara datreveno de la naskiĝo de J. A. Komenius, envicigita en la UNESCO-jubileojn. Ĝi havas specialan signifon precipe ankaŭ por la Esperanto-movado, ĉar Komenius rekomendis kreon de nova universala lingvo, prezentis eĉ ĝiajn kriteriojn, kiujn praktike plenumas Esperanto.

Cl.- Tiu ĉeĥa aŭskultanto Jaroslav KARHAN sendis interesan raporton. Karel KOPECKY en Trebechovice sendis 2 mesaĝojn, kiujn akompanis belaj fotoj pri folkloraj vestaĵoj.

A.- Li scias, ke mi kolektas bildojn de folkloraj kostumoj. Multajn dankojn al Karel KOPECKY.

Cl.- Ĉiam en Ĉeĥoslovakio ni salutu Jiri Laube en Roudnice, kiu sendis 5 mesaĝojn, Ĵiri PATERA en Praha, kiuj ni citu:

A.- "Antaŭ nelonge estis en la klubejo legita letero, kiun nia poeto kaj verkisto Karolo Piĉ sendis al nia prezidento Vaclav Havel jam en decembro pasintjara. Piĉ tiam sendis al Havel du siajn librojn (inter ili verŝajne La Litomiŝla Tombejo). En la letero li skribis, ke ankaŭ

esperantistoj estis iaspekaj disidentoj. Ekzemple la verkoj de Piĉ povis aperi nur eksterlande, pro ideologiaj motivoj..."

Cl.- Ni ankoraŭ citu el mesaĝo de Pet ŜARŜE en Praha:

A.- "Ses monatojn mi ne laboris kaj estis hospitalita en la okula kliniko. Dum mia resaniĝo mi aŭskultis vian radion kaj unufoje mi aŭdis ankaŭ mian nomon - dankon de la paciento por la afabla travivaĵo."

Cl.- Ni esperas, ke Pet ŜARŜE nun reakiris bonan vidkapablon, kaj ankoraŭ diras saluton al Stanislav ŜTEFAN en Kladno.

A.- La venontan semajnon vi aŭdos nian lastan perondan leterkeston. Nepre kaptu ĝin. Vi aŭdis Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Ĝis la reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*